
# DIA REGNO

* dumonata kristana revuo en esperanto * n-ro 2 (863) * 2007 *

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
✆ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- * Membro-subtenanto €30,- * Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- * pagante al Libroservo €18,- * Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. * Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI * Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Storgatan 6 A; S 153 30 Järna; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický; Na Vinici 110/10
✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| La amo de Dio | 27 |
| Amoj | 31 |
| Bonhoeffer | 33 |
| Niaj amaj rilatoj kun Dio | 36 |
| Pri la kristana amo | 37 |
| Ĉio estas transdonita al mi de mia Patro | 38 |
| Amo estas la plej bona instruisto | 41 |
| Nutri la malsatantojn | 42 |
| La vortoj de Jesuo Kristo sur la kruco | 43 |
| Pri la apokrifaj libroj | 45 |
| Pri la tragedioj en la rusaj ortodoksiaj preĝejoj | 46 |
| Dietrich Bonhoeffer - martiro de la 20:a jarcento | 47 |
| Dies irae – Tago de kolero | 48 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

La printempo alvenis, mi pensas, al preskaŭ ĉiuj legantoj. La suno donas esperon pri pli bona vetero kaj ni povos ĝui la florojn kaj la naturon.

La jena numero esats riĉa, eble eĉ densa per diversaj artikoloj. Mi petis kontribuojn pri amo kaj mi ricevis multajn artikolojn pri diversaj temoj rilate al amo. Legu kaj ĝuu la buntan kolekton! Se tiuj artikoloj instigas vin verki ion, reagi al io skribita aŭ vi sentas ke io mankas, ne hezitu sendi al mi! Ne forgesu ke amo estas la temo de nia ĉi-jara ekumena kongreso.

En iu sekvonta numero mi ŝatus prezenti artikolojn pri la dis- aŭ malvastiĝo de kristanismo. Kio okazas? Mi ricevas kontraŭajn informojn. Ĉu tio ankaŭ influas nin kiel kristanaj esperantistoj? Esploru vian regionon kaj informu min, verku artikoleton!

# La amo de Dio

Laŭ prediko la 28an de novembro 1982 de la hungara reformita pastoro József FARKAS (1914 - 1999)

tradukis kaj redaktis lia nepino, Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

> Mi estas la lumo de la mondo; kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo.
>
> Johano 8:12

Dum longa tempo mi tiel pensis, ke ekzistas la transa mondo kaj ekzistas tiu ĉi mondo: en la transa mondo estas lumo kaj gloro, en tiu ĉi mondo estas mallumo kaj mizero. Kiel pli kaj pli plenigas nin la lumo de la transa mondo, tiel estas pli kaj pli malluma tiu ĉi mondo. Kaj kiel pli kaj pli sorĉas nin la falsa lumo de tiu ĉi mondo, tiel pli kaj pli mallumiĝas la lumo de la transa mondo.

Poste Dio instruis al mi ion pli bonan. Pri tio 'pli bona' mi nun mallonge, sumigite tiel diras: la lumo de la transa mondo ne estas por mallumigi tiun ĉi mondon, kontraŭe: estas por tio, ke jam en tiun ĉi mondon ĝi lumigu, lumigu nian homan vivon. En Jesuo Kristo Dio sendis la lumon de la transa mondo tien ĉi, inter nin, ke nia tuta vivo estu lumigita per ĉiela lumo.

Ni vidu la vortojn de la Sankta Biblio en tiu ĉi aspekto!

*"Mi estas la lumo de la mondo; kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo."*

En tiun ĉi frazon la plej grandaj vortoj estas enmetitaj: lumo, mallumo, sekvo de Jesuo, la lumo de la vivo. Ni klopodu bone kompreni ilin, por ke la granda evangelio ekbrilu inter la vortoj. Ni komencu per la vorto 'mallumo'. Jesuo diras: *"kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo"!* Tio signifas, ke kiu ne sekvas Jesuon, tiu iras en mallumo. Do ni klopodu kompreni la signifon de la vorto 'mallumo'. La fenomenoj de la naturo bone montras la spiritajn verojn. Ni vidu tiun ĉi procezon: ekde la splenda sunbrilo, tra la krepusko kaj mallumiĝo, ĝis la nigra nokto. Kio okazas dum tiu ĉi procezo?

---

> "En Jesuo Kristo Dio sendis la lumon de la transa mondo tien ĉi, inter nin, ke nia tuta vivo estu lumigita per ĉiela lumo."

---

La unua paŝo al la mallumiĝo estas, ke la aĵoj griziĝas. Kiam la suno brilas, ĉio brilas en belega multkoloreco, sed kiam la suno subeniras, subite griziĝas la mondo. La dua paŝo estas, ke malvastiĝas la mondo. Kiu kondukas aŭton, bone scias, ke dumtage, kiam la suno brilas, oni povas vidi du-tri kilometrojn antaŭen, sed kiam la suno subeniras, la distanco pli kaj pli mallongiĝas, malvastiĝas.

Kiam jam estas vera vespero, nigra nokto, tiam mi travivas la senton de la soleco. Eblas ke estas homoj ĉirkaŭ mi, sed mi ne vidas ilin, ĉar estas mallumo, kaj kaptas min la sento de la soleco, kiun akompanas la angoro kaj timo. Mi paŝas unu paŝon kaj eble faliĝos en kavon, aŭ koliziiĝas al muro.

Se ni travivas tion, ke griziĝas la mondo – estos indiferenta, kiuj estas ĉirkaŭ mi, kio estas la vero, kio atendas min. Kiam la vivo malvastiĝas – ĝis tiam mi pensadis libere en grandaj gradoj, sed ekde tiam la mondo estas pli kaj pli malvasta, kaj poste malvastiĝis ĝis "mi". Nur mi, mia sano, mia korpo, mia vivo – kaj kompreneble sekvas la angoro.

"En la mallumo estas dinamiko: la mallumo estas ataka, estas agresiva. Se estas lumo en mi, vere el ĉiuj direktoj batalas kontraŭ ĝi la mallumo."

Tiuj fenomenoj ne nur simple ekzistas aŭ ne ekzistas, ili movas, agas, batas nin! En la mallumo estas dinamiko: la mallumo estas ataka, estas agresiva. Se estas lumo en mi, vere el ĉiuj direktoj batalas kontraŭ ĝi la mallumo. Ni travivas tion, ke tiu ĉi mallumo estas sub senpaŭza batado en ni, kaj la mallumo volas venki nian mondon.

Tamen ni ne permesu konduki nin mem al tiuj kristanaj troigoj, ke *"la transa mondo estas nur lumo, kaj tiu ĉi mondo estas nur mallumo"*! Ankaŭ en tiu ĉi mondo ekzistas lumfontoj, kiuj povas doni al ni helpon, kiel gvidi nian vivon. Ekzemple unu tia lumfonto estas



la filozofio, aŭ pli simple la viv-prudenteco aŭ la transcenda pensmaniero. Laŭ la instruo de la Biblio – kaj ankaŭ laŭ nia ĉiutaga sperto – ankaŭ la 'forfalintaj' homoj havas iun orientiĝon en la mondo. Ankaŭ tiuj homoj, kiuj deŝiriĝis de la Biblio, elformigas iun filozofion, pensmanieron, valor-hierarkion. Ekzistas en la homa pensado, vivsperto iu modesta lumo. Aŭ la alia ĉi tia teritorio: la mondo de la psikologio. Estas surprizige, ke en tiu ĉi jarcento ni tiel detale povas vidi la profundecon de nia interna vivo. La psikologo, la psikiatro laboras per iaj lumoj. Ni ne rajtas nei tion! Homoj, kiuj faras malsaĝecojn en siaj vivoj, eble laŭ iu psikologia gvidado komprenas, ke "tion mi faris malbone, ne tiel mi estus devinta fari". Ankaŭ tio estas ia lumo. Aŭ ni povas pensi ankaŭ pri la religiaj praktikoj, ceremonioj. Ni ne devas tute nei la religiajn dogmojn, ĉar ankaŭ en ili respegulas iu praa, antikva lumo, kaj ankaŭ tiuj iom povas gvidi la homojn.

En tiu ĉi vorto de Johano ni aŭdas, ke en Jesuo aperas la lumo de la vivo. Tiu, kiu sekvas Lin, havos la lumon de la vivo, kaj kiu sekvas Jesuon Kriston, ties vivo estos brila, estos resanigita kaj tralumigita per Dia lumo.

Ni pensadu pri tio, kia ŝanĝo okazos

en nia vivo, se ni permesos tiun ĉi lumefikon, se nia vivo estos en la lumo de Jesuo Kristo! Plej simple, se ni reiras al tiuj kvar fazoj de la mallumiĝo, kaj ni rigardos la kontraŭon de la mallumiĝo, ĉar vere tio okazas.

Kiel ekzistas mallumiĝo, tiel ekzistas ankaŭ lumiĝo! Kelkaj homoj dum unu momento vidas sian vivon en ĉiela lumo, sed mi pensas, ke en la plej multaj homoj en malgrandaj paŝoj, gradoj post gradoj okazas la lumiĝo de lia interna vivo.

Mi menciis tion, kiel la aĵoj griziĝas. En la proksimeco de Jesuo Kristo la aĵoj komencas denove brili, splendi. Estas ege feliĉa stadio de la lumiĝo, kiam tiuj aĵoj, kiuj antaŭe estis grizaj, enuigaj, tedaj – komencas brili en belega lumo. La homoj estos eksterordinare valoraj, la muziko estos eksterordinare bela, la vero estos eksterordinare interesa. Ankaŭ mia propra personeco, kiun antaŭe mi juĝis griza kaj malinteresa, komencas esti interesa.

Dum la mallumiĝo la vivo malvastiĝas. Dum la lumiĝo la vivo vastiĝas! La aŭtoroj de la Malnova Testamento same konfesas: *"Vi kondukis min al alta loko, al vasta loko"*. Kiam nia vivo ricevas la Dian lumon, Dio preskaŭ levas nin kaj ni pli bone vidas la mondon, kaj ankaŭ tio interesos nin, kio ĝis nun ne interesis nin.

La tria ŝtupo de la mallumiĝo estis, ke ni travivas la amarecon de la soleco. La donaco de la lumiĝo estas, ke mi ricevas fratojn, kaj mi komprenas, travivas, ke mi ne estas sola! Inter la milionoj de la homoj estas kelkaj, kiuj povas ege proksime esti al mi laŭ la penso de Dio, kaj en tiu ĉi malgranda grupo (du, tri, dek – kiom Dio donas) ni multe pli plenan vivon povas vivi. Mi spertas la stabilecon, varmon, ke mia homa vivo ne finiĝas, kie estas la limo de mia korpo, kune kun miaj fratoj mi estas unu korpo. La unuaj kristanoj tiun travivis, ke ni estas unu korpo, unu animo en Kristo.

Eble plej mirakla estas la kvara paŝo, pri kiu mi tiel diris ĉe la mallumiĝo, ke plenigas mian koron la angoro kaj la timo je la soleco: en tiu vastiĝo, kien Dio kondukas nin dum la lumiĝo, okazas la kontraŭo: ĉesas la angoro kaj mi sentos fidon je la homoj. Mi fidos ankaŭ je tiu homo, pri kiu mi scias, ke li estas mia malamiko. Mi fidos, ke li ne povas pli multe malbonfari al mi, nur tiom, kiom Dio permesas, kaj mia hieraŭa malamiko estos mia morgaŭa amiko. Tiun fidon donas al mi Dio.

---

"Kiam nia vivo ricevas la Dian lumon, Dio preskaŭ levas nin kaj ni pli bone vidas la mondon, kaj ankaŭ tio interesos nin, kio ĝis nun ne interesis nin."

---

Ni eldiru la finan vorton: *amon* donas Dio. La pleneco de la lumiĝo estas, kiam la Dia amo brilas al mi, plenigas min kaj pluen brilas el mi.

Miaj gefratoj, tio estas stranga en tiu ĉi situacio – kaj ankaŭ malfacila – ke nur tiu scias, kia estas la mallumo, kiu jam estas en la lumo! Kiu estas en la mallumo, ne scias, ke li estas en la mallumo! Kiam ni paŝoj post paŝoj elvenas el la mallumo al la lumo, kaj ni reenrigardas, tiam ni komprenos, kiel ni vivis, kiel ni pensadis. Mia Dio, kiaj estis miaj tagoj

kaj noktoj, miaj pensoj kaj agoj! Ke mi diru nur kelkajn ’kriadajn’ ekzemplojn: la estinta alkoholisto, kiam lia nervosistemo trankviliĝas en Jesuo Kristo, ricevas pacon, ĝojon, novan vivon, tiam li povas vidi, kiel li agis, frakasis kaj blasfemis en tiu terura stato. Antaŭe li ne sciis, en kiu stato li estis, tiam li opiniis, ke tia estas la vivo. Aŭ la plej malfacila ekzemplo: se iu elvenas el sia depresio al la interna paco kaj vivoĝojo. La depresio havas terurajn profundojn, kaj se iu, kiel dia miraklo povas elveni el tiuj profundoj, bone scias, kion signifas, ke Jesuo Kristo estas la lumo de la vivo, kaj kiel mirakle estas vivi en tiu ĉi lumo!

> “Miaj gefratoj, tio estas stranga en tiu ĉi situacio – kaj ankaŭ malfacila – ke nur tiu scias, kia estas la mallumo, kiu jam estas en la lumo! Kiu estas en la mallumo, ne scias, ke li estas en la mallumo!.”

Sed ni devas esti singardaj, ĉar la kristanoj dum la ĝuo de la bonaj gustoj de la savo, povas fari troigojn. Per mia lasta penso mi ŝatus senmaskigi tiun fenomenon kaj gvidi nian pensadon al la bazo de la realeco.

Ĉio, kion mi diris, estas vero. Laŭvorte estas la vero – almenaŭ mi tiel kredas, ke Jesuo Kristo estas la lumo de la mondo.

Sed kiam mi pensadis hejme, mi rememoris pri tiu ĉi kupro-reliefo, kiu estas tie ĉi, sur la muro en nia preĝejo, kaj kies titolo estas *“Jesuo estas la lumo de la mondo”*. Sur tio reliefo, kiel vi bone scias kaj vidas, estas unu kandelo. La homo unue sentas kontraston: la lumo de la mondo estas unu kandelo? Laŭ mi, la juna artisto, kiu faris tion, ege bone komprenis, ke Jesuo estas la lumo de la mondo.

Mi ricevas la dian lumon en Jesuo Kristo, tio ne faras min la prudentulo de la mondo. Pro tio mi ne estos la plej saĝa homo de la mondo, kvankam mi travivas la maksimumon de la komunecon kun Jesuo Kristo. Tiu ĉi vorto avertas min pri la modesteco! Jes, Jesuo Kristo estas la lumo de la mondo, la fina, dia lumo de la tuta homaro ekbrilis en Li, kaj tio signifas, ke Jesuo montras al mi la sekvontan paŝon. Mi restos homo, multajn aferojn mi ne komprenas, mi komprenas nur la sekvontan paŝon.

Estas la vero, ke en la ĉiela mondo ĉirkaŭbrilos min la dia lumo, la brilo de la Spirito. Nun mi vidas nur je la lumo de kandelo, sed tio tute sufiĉas, ke mi vivu, ke transcendan, riĉan vivon mi vivu modeste, humile, ĉar la sekvontan paŝon ĉiam montros al mi Jesuo Kristo. Al multaj grandaj, mondvastaj demandoj mi ne scias la respondon, sed mi scias kion mi devas fari kaj hodiaŭ kaj morgaŭ en mia familio kaj en mia laborejo.

Do en la mondo de la mallumo ni iros al la lumo, kaj iam ni alvenos. Tiam ni komprenos, ke la fina esenco de la lumo estas la *amo*. La fizikistoj diras multon pri la lumo: estas ondoj, estas radioj, sed ili diras ankaŭ tion, ke la lumo estas partikloj. Tiel la dia lumo vere estas ondo, kiu briligas la mondon, sed la eroj, partikloj kiuj estas en ĝi, estas **la amo de Dio**.

# Amoj

Laŭ C.S. Lewis

En la tria apero de la Sinjoro Jesuo post Lia releviĝo, la Sinjoro faris demandon al Petro. Tiu demando trifoje ripetita estis "Simon, filo de Jona, ĉu vi amas min?" kaj ĉiam la respondo de Petro estis "Jes, Sinjoro, vi scias ke mi vin amas." Stranga afero pri tiu dialogo, kiam ni legas ĝin en la originala Greka, estas ke la vorto kiun Petro uzas (φιλω) kaj kiu tradukiĝas kiel 'amas' ne estas la sama kiel tiu en la demando de Jesuo (αγαπω) kiu ankaŭ tradukiĝas kiel 'amas'.

Ĉu Petro donis al la Savinto la respondon kiun li atendis? Ĉu li respondis ion iomete malsimila de tio kion Jesuo petis de li? Ĉu estas nuancoj en la vorto 'amas' kiuj ne transiras en la tradukado de tiuj malsimilaj vortoj?

C. S. Lewis estis eminenta preleganto kaj autoro kiu multe verkis - iujn kiuj estis fikciaj, precipe por infanoj, kaj aliajn kiuj estis seriozaj studoj pri kristanaj temoj. Kvankam naskiĝinte en Irlando, li iĝis elstara klasika studento en la Universitato de Oksfordo kie post diplomitiĝo li restis dum multe da jaroj, antau ol iri al Kembriĝo kiel profesoro. Li pasigis sian tutan profesian vivon en Anglio kie li mortis en 1963. Nuntempe inter la publiko liaj plej bone konataj verkoj estas "Kronikoj de Narnio", kaj liaj kristanaj verkoj ankoraŭ allogas kristanajn kaj aliajn legantojn

Lewis intencis verki libron pri amo, uzante kiel bazon la verson en la unua epistolo de Johano en kiu li diras, *"Kiu ne amas, tiu ne konas Dion, ĉar Dio estas amo."* (1 Joh 4:8), sed li baldaŭ komprenis ke li devas analizi la tutan koncepton de amo kaj difini la elementojn el kiuj la vorto konsistas. Ĉu ni ĝuste uzas la vorton, kiel en 'amo de ĉokolado' aŭ 'amo de mia lando'; aŭ eĉ kiam samideanoj portas ĉemizojn sur kiuj estas la devizo "Mi amas Esperanton"? La fina rezulto estas ke Lewis donis al sia libro la titolon "La kvar amoj" kiuj estas Afekcio, Amikeco, Eros kaj Karitato.

**Afekcio** estas la plej humila amo kaj estas simpla kaj natura rilato inter du personoj, ofte kiam estas ia komuna intereso, kaj kelkfoje eĉ kiam ne estas. Lewis diras:

*Ĝi instruas nin unue rimarki iun (aŭ iujn), poste rideti al li, poste ĝui la evoluon de hazarda renkonto kun li. Ĝis iu grado, tio povas ekzisti inter instruisto kaj lernejano, aŭ inter maljuna blindulino kaj beleta knabino kiu regule helpas ŝin transiri la straton. Renkontiĝo kun iu por kiu ni havas afekcion estas simpla plezuriga afero en si kaj nenio pli.*

**Amikeco** estas sperto kiun neniu

deziras ne havi. Esence, ĝi estiĝas inter individuoj. En tiu momento kiam du homoj amikiĝas ili sin tiras el la amaso, sed ne necesas ke ili restas ekskluzive du. Ofte ili enprenas aliajn en sian rondon kiam la ligado plilarĝiĝigas la plezuron de tio kio interesas ilin. Se oni serĉas amikon sed nur amikon, ne havante komunan celon, ilia amikeco rapide finiĝos. Kio estas komparebla kun la amikeco, kiam amikoj kunvenas, parolas, ludas, ŝercas kaj ĝenerale eligas tion, kio estas plej bona, plej amuza, plej saĝa en la aliaj? Interesa komento de Lewis je la fino de tiu ĉapitro estas: Kristo kiu diris al siaj disĉiploj, "*Vi ne elektis min, sed mi elektis vin"* povas vere diri al ĉiu grupo de kristanaj amikoj, "Vi ne elektis unu la alian, sed mi elektis vin unu por la alia".

La trian amon pri kiu Lewis skribas li nomas **Eros** per kiu li celas ne priskribi seksecon aŭ eroton, sed la puran emocion kiun Paŭlo uzis kiam li komparas la rilaton de amanta paro (edzo kaj edzino) kun la rilato inter Kristo kaj la Eklezio (Efe. 5:25)

Tiuj tri estas naturaj amoj, sed ne sufiĉaj en si mem esti parto de tiu kvara amo kiu estas **Karitato**. Niaj naturaj amoj ne estas rivaloj de la amo de kaj al Dio, sed plie ili trovas veran plenumon kiam ni lernas ami Dion. Karitato estas senlima, ĉar ni ne malpli amas niajn amikojn, ne malpli montras afekcion al niaj najbaroj kiam ni amas Dion. La naturaj amoj ne povas anstataŭi la amon de Dio; ili trovas sian plenumadon nur kun la helpo de Dio. La amoj devas submeti sin al dua loko se ili deziras trovi sin esti parto de Dia amo. Kiam Dio regas en la homa koro, la aŭtoritato de Dio en amo estas superega.

"Oni ne donu tro da amo al iu krom Dio", diris Aŭgusteno, ĉar estas mizero kiam tiu 'iu' mortos. Se amo devas esti ĉiama beno, neniam mizero, ĝi devas esti por la sola Amato kiu neniam forpasos. Alproksimiĝado al Dio estiĝas, ne per provoj eviti suferadon pro troa ofero de amo, sed per akcepto de ili kiel parto de la Dia Volo. Naturaj amoj povas esti malmoderaj. Estas eraro diri ke oni ne povas tro ami personon, sed ni povas tro ami proporcie al nia amo al Dio. Estas en la malgrandeco de nia amo al Dio, ne la grandeco de nia amo al homo kie kuŝas la malmodereco.

Jesuo diris, *"Se iu venas al mi, kaj ne malamas sian patron kaj sian patrinon kaj sian edzinon kaj siajn infanojn ... kaj eĉ ankaŭ sian vivon, li ne povas esti mia disĉiplo."* Kion ni povas kompreni pri tia esprimo de malamo? Ŝajnas kontraŭdiro ke Amo Mem (ĉar Dio estas Amo) ordonu malamon. Lewis diras ke oni devas malakcepti, rifuzi ion 'bonan' (ne necese 'malbonan') se ĝi estas senutila por la celoj de Dio. Ĉu ne Jesuo diris, *"Iru malantaŭ min, Satano."* al Petro?

Do, ni devas rilati la naturajn amojn al tiu Amo kiu estas Dio. Dio estas Amo, ĉar ĉu ne Dio, kiu nenion bezonas, ame kreis nenecesajn kreitojn, homojn por ke Li amu kaj perfektigu ilin por sia gloro. Kiel Kristo estas perfekta Dio kaj perfekta Homo, tiel la naturaj amoj devas estiĝi perfekta Karitato kaj resti perfektaj naturaj amoj. Dio estas Amo, kaj nur tiuj en kiujn Amo Mem eniris, supreniros al Amo Mem.

# Bonhoeffer (1906-1945)

Bazita sur prelego ĉe la Dua Eŭropa Ekumena Kunveno Graz 1997

Kompiliis: Siegfried KRÜGER, DE

Bonhoeffer naskiĝis 1906 en Breslau (Wrocław) kiel sesa el ok infanoj; la familio, en kiu Dietrich elkreskis, apartenis al la klera elito en la germana regno,

1923 teologia studado en Tübingen, Rom kaj Berlin,
1928 vikario en Barcelona,
1931 studrestado en New York, pastoro por studentoj en Berlin,
1933 eksterland-pastoro en London kaj teologia konsilanto de la Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj,
1935 estro de la predikista seminario de la konfesanta eklezio en Finkenwalde apud Stettin,
1936 nuligo de la instru-permeso por Bonhoeffer,
1937 fermo de la seminario pere de la “Gestapo” (sekreta ŝtata polico); daŭrigo kontraŭleĝa,
1940 komenco de la konspira agado kiel kuriero de la rezist-grupo en la hitlera organizo “defendo”,
1943 aresto pro rezisto kontraŭ la naziisma reĝimo; 18 monatojn en Berlin-Tegel, 5 monatojn en la Gestapo-kelo en Prinz-Albrecht-Str, 2 monatojn en la koncentrejo Buchenwald,
1945 ekzekuto per ŝnurego en la koncentrejo Flossenbürg, kvar semajnojn antaŭ la senkondiĉa kapitulaco de Germanio.

La verko de Bonhoeffer same kiel lia ĉesigita vivo restis fragmento.Tamen li fariĝis unu el la grandaj instigantoj de la postmilita teologio kaj li ankaŭ ludas rolon en la liberigaj eklezioj kaj movadoj en suda Afriko. Kaŭzo nelaste estas la fascina ligo inter vivo kaj penso. En lia vivo plastikiĝas lia penso, kaj en lia penso trabrilas signifo, kiu postvivas la aktualan historion. Vivo kaj penso gajnis specialan aŭtoritaton per la martira morto. Baza penso de li estas la senkondiĉa sekvado de Jesuo Kristo kaj vivo laŭ la montprediko. Bonhoeffer estis eklezi-kritika; spiritan parencecon li havas ekzemple kun Francisko el Assisi, Martin Luther kaj kun la frataro de Taizé. Dum la naziisma influado de la eklezioj li baldaŭ konstatas, kie staras la antikristo. Aliuloj ofte estas trompitaj per la maskiĝado de la malbono, kiu kirlis ĉiujn etikajn terminojn: la malbono montras sin en formo de la lumo, de la bonfaro, de la historia neceseco kaj de la sociala justeco. Li ne kompromisis sed konstatis, ke enirinte malĝustan trajnon ne sufiĉas, se oni nur en la flanka kori-




Dietrich Bonhoeffer
Matthäuskirche, Berlin



doro iras kontraŭ la veturdirekto. La instruo el la vivo kaj morto de Bonhoeffer malpli estu la imitado, sed la sekvado de Jesuo.

La sekvanta elekto el liaj pensoj kontribuu al pli bona kompreno:

- Ne ekzistas vojo al paco sur la vojo de sekureco. Ĉar la pacon oni devas riski, ĝi estas la sola granda risko, kaj neniam estas sekurigebla. Paco estas la malo de sekureco.
- Libera respondeco baziĝas je Dio, kiu postulas la liberan kredo-riskon de respondeca ago kaj kiu donas pardonon kaj konsolon al tiu, kiu pro tio fariĝas pekulo.
- Ekzistas tri eblecoj de eklezia agado:
  1. Unue, la demandoj direktitaj al la ŝtato pri la legitima ŝtata karaktero de ĝia agado; tio estas la respondecigo de la ŝtato.
  2. Due, la servo por la viktimoj de ŝtata agado. La eklezio estas devoligita al la viktimoj de ĉiu sociordo, ankaŭ se ili ne apartenas al la kristana komunumo.
  3. La tria ebleco estas tia, ke oni ne nur bandaĝu la viktimojn sub la rado, sed mem haltigu la radon kaptante la radajn spokojn.
- Neniu homo konstruas la eklezion, sed sole Kristo. Kiu intencas konstrui eklezion, tiu certe jam komencis la verkon de la detruo.
- La Sinjoro de la tempoj estas Dio. La turnopunkto de la tempoj estas Kristo. La spirito de la nuna epoko estas la Sankta Spirito.
- La obeo montras al la homo, ke devas esti dirata al li, kio estas bona kaj kion Dio postulas de li; la libereco lasas al la homo mem fari la bonon.
- Eklezio kaj miseklezio ne povas havi komunecon.
- Nur kiu krias por judoj rajtas kanti gregoriane.
- Kio estas vivo kun Kristo? La eklezio devas ekzemple vivi ĝin.
- “Esti-servemaj-por-aliuloj” estas la partoprenado je la estado de Jesuo.
- Jesuo ne vokas al nova religio; li vokas al la vivo.
- La homo estas vokita, kunsuferi la suferon de Dio pro la sendia mondo. Ne la religia ago kreas kristanojn, sed la partoprenado je la suferoj de Dio dum la surtera vivo.
- La religieco kondukas la homon en sia mizero al la potenco de Dio en la mondo. La Biblio kondukas la homon al la senpotenco kaj la sufero de Dio; nur la suferanta Dio povas helpi.
- Kristana komuneco estas unu el la plej grandaj donacoj, kiujn Dio donas al ni.

Okaze de la jarŝanĝo 1944/45 Bonhoeffer skribis el la karcera ĉelo – nur kvar monatojn antaŭ la morto – al sia patrino kaj sia fianĉino la versojn, kiuj fariĝis por sennombraj homoj fonto de

**Sub ŝirm' mirinda ...**

(ADORU 490)

1. Sub ŝirm' mirinda de potencaj bonaj
l'estonton kun trankvil' atendas ni.
apudas Di' vespere kaj matene,
kaj ĉiun novan tagon sendas Li.

2. Se temp' antaŭa plu turmenton donas,
se tag' malbona premas per angor',
la savon donu, kiun vi proponas,
ho Di', por nia terurita kor'.

3. Kaj se kalikon donas Vi amaran,
sufero-plenan, pezan ĝis ekstrem',
ni prenas ĝin el Via man' amata;
dankeme, fidoplene kaj sen trem'.

4. Se tamen Vi ankoraŭ donos ĝojon
pri tiu mond' kaj ĝia brila sun',
ni rememoros la iritan vojon;
nur Via estu nia vivo nun.

5. Dum ĉiu tera bruo iĝas febla,
por ni laŭtiĝu tiu plen-sonor'
el via vasta mondo nevidebla,
akordoj ravaj de l'eterna ĥor'.

Dietrich Bonhoeffer

firma espero kaj konsolo. Adolf Burkhardt tradukis la kanton (melodio Otto Abel) en la jaro 1977 en Esperanton. El la superaj strofoj mankas tiu, kiu rilatas al la jarŝanĝo, kaj pro tio la kanto ankaŭ hodiaŭ povas peri sian eternan mesaĝon.

**Pliaj citaĵoj de Bonhoeffer:**

- "El amo al la homo Dio homiĝis."
- "Jesuo Kristo, la releviĝinto, tio signifas, ke Dio el amo kaj potenco venkis la morton kaj nova kreaĵo estas vokita, nova vivo donacita."
- "Kristo paŝas surtere tiel longe, kiel ekzistos homoj. Li estas via proksimulo, per kiu Dio alvokas, alparolas kaj postulas vin. Tio estas la plej granda seriozeco kaj la plej granda beateco de la adventa mesaĝo. Kristo vivas en la figuro de homo inter ni."

"Dio estas la Amo", tio estas la ĉefa temo de la ekumena kongreso 2007. Ĉu la vivo de Bonhoeffer atestis tiun amon? Al mi ŝajnas, ke jes. Li donis sian vivon en tempo, kiam nur malmultaj homoj kaj eklezioj sufiĉe forte kontraŭis la tiaman reĝimon. Fortigis lin la Dia Amo kaj la postsekvo al Jesuo. En granda libereco li mem decidis partopreni la movadon por mortigi la despoton Hitler, fidante al la pardonema Dio.

La poemo kaj kanto „Sub ŝirm mirinda ...." respegulas tian fidon.

Honorofice mi ĉiun mardon kun aliaj helpantoj vizitas homojn en flegejo por maljunuloj por distri ilin iomete. Je la fino de la kunveno ĉiuj prenas la manojn de la najbaroj kaj ni diras komune:

*Sub ŝirm' mirinda de potencaj bonaj*
*l'estonton kun trankvil' atendas ni.*
*apudas Di' vespere kaj matene,*
*kaj ĉiun novan tagon sendas Li.*

Tiuj estas vere konsolaj vortoj por homoj survoje al la fino de la surtera vivo.

# Niaj amaj rilatoj kun Dio.

Zecchin Armando kaj Silvia Garnero, IT

La redaktoro de Dia Regno invitas diri ion pri tiu temo miriga kaj alloga. Se eblas miri kaj allogiĝi antaŭ la fakto ke eblas ame rilatiĝi vere reciproke kun Dio, necesas ankaŭ malkovri ke tiu anonco estas karakteriza kaj esenca en kristanismo. Oni diskutas ĉu tia senpaga amo el Dio al homo troviĝas ankaŭ ĉe aliaj religioj. Se io simila estas tie kaj tie malkovrebla, kristanoj certe feliĉas, ĉar tiuj tamen estas nur spuroj al la kompleta revelacio… Sed nun nia atento iru aliaspekten pri tiu temo.

Oni diris, kun senvaloriga akuzo por kolapsigi kristanismon, ke tiu ĉi ĉerpis el la greka filozofio, kies alportaĵoj tute malkristanizis originalan kristanismon de Jesuo… Do ni vidu kio estas instruata ĉi-rilate, nome pri la ebla amo de Dio al la homo, pri la amo descenda, kiel estas skribata en la komune interkristana laŭdata "Deus caritas est = Dio estas amo". Nu, ĝuste la praaj grekaj filozofoj ekskludas ke povas kreiĝi amikeco inter Dio kaj homo: homo certe povas anheli al Dio, sed por Dio sopiri al la homo estus kontraŭracia kaj malebla, nome memkontraŭdia. Ni vidu pli eksplicite.

Platono, la filozofo kiu pli ol ĉiuj kvazaŭtemis pri tio, faras el Dio amkapablulo, kiu havas kelkan emon al la homo, sed neniam li imagigas, ke Dio serĉas amikecon kun la homo kiel kun amiko. Eble lin bremsis la vizio pri amo, propra de la antikvaj grekpopoloj jam transdoniĝinta al aliaj mediteraneaj kulturoj, kiu difinindikas amon ĝin enkalkulante en egoisma sfero-percepto. Fakte, por la helena ideologio-mitologio, la volo estas fakulto-kapablo fundamente tendenca, deziriganta, sopiriganta. Nu, estas dezirata kaj sopirata kio ne estas jam posedata, tial amo estas deziro stopi mankon kaj plenigi senhavecan vakuon. Platono diras, ke amo estas filo de Poroso, dio de la serĉado kaj ruzeco-portrovi, kaj de Penio, diino de la senhaveco. Malsame, laŭ kristanismo amo estas senprofita dono, inklino kaj prizorgo pri la bezonoj de aliulo (kio tamen ne ekskludas aliajn avantaĝajn efikojn, kvankam necelatajn). Veras ke aliaj tekstopartoj de la platonaj tekstoj kontraŭdiras lian centran penson, ĉar ili parolas pri iu senprofitemo en la amo kiun Dio havas al la homo, sed fakte tuta lia pensado distanciĝas de la ideo kiu nutrus dian amikecon al la homo.

Ankaŭ jam en Aristotelo estis proponata la sama egoisma percepto pri amo. En liaj tekstoj troviĝas partoj en kiuj estas lumigita vizio senprofita pri amo (Nikomaka etiko); sed aliaj punktoj, tiuj koheraj kun esenca lia filozofio, foriĝas el la senco de la unuaj, ekzemple: "ĉiu deziras la bonon avantaĝe de si mem". Tial Aristotelo opinias, ke Dio ne kapablas ami la homon, ĉar tio estus simptomo

de malperfekteco kiun Dio provus rimedi per amikeco al la homo kaj tio absurdus ĉar Dio estas perfekta do sendezira. Estas, eble, tekstoparto blovanta en la direkton de iu speca inklino al amo al la homo, ankoraŭ en la Nikomaka etiko; tamen, ĝenerale la aŭtoro teorias ne nur pri Dio neamanta al la homo, sed tion eĉ ne pensus Dio (v. Metafiziko). Laŭ li Dio ne povas ami la homojn, tiu ĉi povas nur esti objekto de ilia amo: objekto ne subjekto de amo.

Kristanismo, male, enkondukas la koncepton de amo ne nure ascendanta al Dio, sed descendanta, nome dono, senbezono ricevi, sen adekvata responda postulo, kaj kulminas en la esprimo: Dio estas amo.

Ĉu tio estas adekvatiĝo de la naskiĝanta kristanismo al helenismo? Malfacilas tion pensi se oni respektas la historion de la homaj pensadoj.

Veras tamen - tio diratu por kompletigi tiun ekinformon - ke el tiuj frazoj aludantaj al descenda amo flanke de Dio, de la du filozofoj kaj de aliaj postvenintaj, kristanaj, aŭ ne, pensuloj plezuriĝis trovi koincidojn inter kristanismo kaj helenismo ĝisatingi la konvinkon ke, ĉi-punkte, la du ne eblas separi!

Tiklas konkludi per ŝajna, nur ŝajna, sciafektaĵo: tiu volamo atribuata al Dio, estas certe homa koncepto kaj difino kiuj estas veraj kaj neveraj samtempe, ĉar Dio estas tutmalsama ol ni: estas ekzakte li – per inspiritaj homoj – kiu diras ke mem estas "amo". Sed evidente li ne estas abstraktaĵo aŭ senkontrola pasiemo, kvankam nobla. Eble direblas ankaŭ ke Dio "estas amanto, la vera tute senegoisma amanto". Ankaŭ tio estus metaforo, sed eble pli intuicebla. Sed ek la Johana difino pri Dio. "Dio estas amo" ☙

# Pri la Kristana Amo

Mallonga recenzo de Bengt Olof Åradsson

La nuna papo Benedikto XVI skribis sian unuan enciklon pri la kristana amo (tradukis en Esperanton Reinhard HAUPENTHAL). La temo estas 1 Joh 4:16, same kiel en la ĉijara ekumena kongreso. La unua parto temas pri "la unueco de la amo en la kreitaĵo kaj en la historio de la savo". Ĝi okupiĝas pri la amo de al la homo. La papo pritraktas la temon inter alie el lingva vidpunkto ĉar la tradukita vorto 'amo' havas diversajn signifojn en la bibliaj tekstoj sed ankaŭ en nia kompreno. Hodiaŭ en la socio kaj en diversaj grupoj la vorto 'amo' estas multe (mis)uzata. La dua parto de la enciklo temas pri la karitato de la eklezio kiel "komunumo de la amo". Pere la Filo, la krucumiĝo kaj la Dia Amo, la Spirito estas forto transformanta la koron de la eklezia komunumo por ke ĝi en la mondo estu atestanto por la amo de la Patro. ☙

# Ĉio estas transdonita al mi de mia Patro

## Mat 11:27-30

Elmer ESCOTO, HONDURAS

> Ĉio estas transdonita al mi de mia Patro, kaj neniu konas la Filon krom la Patro, nek iu konas la Patron krom la Filo, kaj tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin. (28) Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. (29) Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. (30) Ĉar mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza.
>
> Mat 11:27-30

Jen unu el la plej konataj versikloj el la Biblio, vortoj de Nia Sinjoro mem. Eble eĉ ne-kristanoj iam aŭdis tiajn vortojn, aŭ legis ilin ie.

Sed, kion tio vere signifas?

***Ĉio estas transdonita al mi de mia Patro (v.27)***

Ĉi tie ni povas rimarki, ke krom Dio, Jesuo havas la plej altan postenon en la tuta kreaĵaro. Ni povas tion konstati legante ankaŭ kelkajn aliajn versojn tra la Biblio, komence de la Malnova Testamento, (ekz Gen 49:10; Psa 110:1; Jesaja 9:6,7) kaj ankaŭ en la Nova Testamento (Mat 28:18; Luk 22:29; Joh 3:35; 13:3; 1 Kor 15:25-27; 1 Pet 3:22).

Sed ni povas ankaŭ rimarki la obeemon de Jesuo, Lian humilecon. Li diris "transdonita al mi de mia Patro" tiel asertante, ke li ricevis ĉion ĉar la Patro tion decidis. Kvankam li meritas ĉion, Li ne montras arogantecon. Jes, Jesuo sin humiligis kaj fariĝis obeema (Flp 2:8).

***nek iu konas la Patron krom la Filo, kaj tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin***

Jesuo bone konas la Patron, ĉar Li estas la Filo, kaj krom tio, Li ĉiam estis kun la Patro (Joh 1:1)

Kaj li volas transdoni al ni konon pri La Patro (Joh 8:19; Joh 14:7; Joh 15:15 ktp).

Kian grandegan lecionon Li instruis al ni! Li, la Filo de Dio, kiu ricevis ĉian aŭtoritaton, ne estas aroganta kaj kontraŭe, volas havi kunulecon kun ni! Pro tio Li invitas nin.

***Venu al mi (v.28)***

Venu. La vorto sugestas, ke ni estas malproksimaj. Tiu vorto "venu", en la greka originalo estas "deute"(δεῦτε) kaj ĝi estus pli ekzakte tradukita kiel "alproksimiĝu". La voko estas do "alproksimiĝu al mi". Ni estis malproksimaj de Dio, ekde la tempo kiam Adamo kaj Eva pekis en la ĝardeno.

Ni memoru pri tio en Genezo ĉap 3.

Tie ni povas legi, ke Dio kutime venis al ili, parolis kun ili; ili estis, do, proksimaj al Dio kaj havis kunulecon kun Li. Tia kunuleco (greke "koinonia") malaperis pro la peko.

Sed la Filo de Dio vokas nin alproksimiĝi al Dio, pere de Li. Dio ĉiam vokis nin. Ekde la pratempo, ekde la tempo kiam Adamo kaj Eva pekis. Lia voko estas ĉie tra la Skriboj. Vidu, ekz Jes 45:22; Jes 55:1-3.

Kia nekomparebla invito! Kaj tia invito venas de La Sinjoro mem!

***ĉiuj***

Senescepte. NE nur predikantoj. NE nur kleruloj. Ne nur viroj, ne nur virinoj, ne nur sanktuloj. La vorto estas "ĉiuj". Do ankaŭ ni estas invitataj de la Sinjoro. Ne gravas se iu estas malĉastulo, idolano, adultulo, malmoralulo, viruzaĉanto, ŝtelisto, avidulo, drinkulo, insultanto, rabemulo... la voko estas ankaŭ por tiu, ĉar la malnoblajn estulojn de la mondo, kaj la malestimatajn Dio invitas. Kaj Li purigos ĉiajn malpuraĵojn, Li pardonos ĉiajn pekojn de ĉiuj homoj.

Ni legas en 1 Kor 6:11 *"Kaj tiaj estis kelkaj el vi; sed vi laviĝis, sed vi sanktiĝis, sed vi justiĝis en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj en la Spirito de nia Dio."*

Gloru al Li! Ĉar Lia kompato estas pli granda ol la pezo de niaj pekoj! Pli granda ol la pezo de ĉies pekoj. Kal al "ĉiuj" Li direktas Sian vokon.

***laborantaj kaj ŝarĝitaj***

Jen ni havas du interesajn vortojn. Ni ekzamenu ilin.

"Laborantaj" estas traduko de la greka vorto κοπιωντες (de Κοπιάω, kopiao). Tiu vorto signifas "lacaj".

Ni povas esti lacaj pro multaj kialoj. Ĉiutagaĵoj kapablas lacigi nin. Iri ĉiam al la laborejo, vidi ĉiam la samajn homojn, fari ĉiutage la samajn aferojn, legi ĉiam malbonajn novaĵojn en la ĵurnaloj, spekti kiel la prezoj de benzino kaj de ĉiuj varoj plialtiĝas... ĉiuj tiaj cirkonstancoj povas nin lacigi.

Ni povus ankaŭ esti lacaj en la spirito. Kiam ni opinias, ke pro multa surgenuado, pro multa ripetado de la samaj preĝoj, pro multa disdonado de mono aŭ varoj al la malriĉuloj ni gajnos pacon kaj eternan vivon, ni laciĝas, ĉar nenio kion ni kapablas fari, nenia bona faro donos al ni eternan vivon kaj spiritan pacon. Tion donas nur Jesuo, kiam ni kredas je Li. Sed multegaj homoj klopodas mem saviĝi per si mem kaj tio lacigas ilin.

Kaj la plej laciga afero estas la peko. Kiam ni estas malproksime de Dio, ni ne povas havi ripozon, ĉar nur en Dio ni trovas ĝin. Kaj peko malproksimigis nin de Dio, kaj pro tio homoj laciĝas, ĉar la pezo de la pekoj estas tro granda.

La alia vorto, "ŝarĝitaj" en la greka estas πεφορτισμενοι (de φορτίζω, fortizo). Ĝi signifas "ŝarĝi" kvazaŭ ŝarĝi per troaj ritoj kaj troaj reguloj. Tio abundis jam en la tempoj Nova-Testamentaj. La fariseoj kaj sadukeoj tiutempe multege ŝarĝis la popolon. Ni legas en Mat 23:4 *"Ili ligas pezajn ŝarĝojn malfacile porteblajn, kaj metas ilin sur la ŝultrojn de homoj; sed ili mem ne volas movi ilin per sia fingro."*

Kaj tio abundas ankaŭ niatempe. Multaj eklezioj ŝarĝas siajn eklezianojn per pezaj ŝarĝoj de laŭlegalismo: Vi ne povas fari tion. Vi ne povas diri tion. Vi ne rajtas iri tien. Vi ne rajtas porti tion. Vi ne devas vestiĝi tiel. Vi ne rajtas tion, ktp. Sed estas aliaj kiuj ne predikas "Ne faru", sed predikas "Faru, Faru, Faru": Vi devas surgenui kaj tiamaniere promeni kilometron. Vi devas vin mem skurĝi. Vi devas ripetadi tiun preĝon 200-fojojn. Vi devas fasti. Vi devas pagi viajn dekonaĵojn. Vi devas, vi devas, vi devas...

Kaj pro tio homoj kiuj eble tre sincere serĉas Dion ne plu Lin serĉas, ĉar oni instruis al ili, ke por trovi Dion, oni devas porti pezajn ŝarĝojn neporteblajn, kaj laciĝas.

Sed Jesuo invitas nin veni al Li por ripozo!

***mi vin ripozigos***

Ho! Kia promeso! Li nin ripozigos!

La greka vorto ĉi tie estas αναπαυσω (de ἀναπαύω , anapaŭo) kaj ties signifo estas "permesi al iu ĉesi laboron por refreŝigi la fortojn" kaj ankaŭ "kvietigi", "trankviligi".

Por pli bone kompreni la sencon kaj nuancon de tiu greka vorto, ni vidu alian tekston kie tiu vorto uzatas, Luk 12:19 *"Kaj mi diros al mia animo: Animo, vi havas multajn posedaĵojn, provizitajn por multaj jaroj; ripozu, manĝu, trinku, estu gaja."* Ĉi tie ni perceptas sencon de trankvilo, kvieto, sekureco.

Imagu la sekurecon, la pacon ekzistantan en la ĉeesto de Dio. Imagu la pacon de Jesuo post kiam li plenumis sian mision kaj sidiĝis dekstre de la Patro. Tian ripozon, tian sekurecon kaj trankvilon li volas transdoni al ni.

En Joh 14:7 li diris *"...mian pacon mi donas al vi; ne kiel la mondo donas, mi donas al vi. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu."*

Tia estas la paco kiun Li donas.

En venonta kontribuo mi skribos pri la restantaj versikloj (29 k. 30)

Dio benu vin.



Pentristo: Fattori, Giovanni

# Amo estas la plej bona instruisto

MU Binghua, Ĉinio

Antaŭ multaj jaroj estis profesoro kies nomo estis Johan Hopkin. Li aranĝis al siaj diplomiĝontaj studentoj tian taskon: Iru al malriĉula kvartalo, tie serĉu 200 knabojn en la aĝo de 12 ĝis 16 jaroj, esploru iliajn fonon kaj kreskan medion kaj poste prognozu ilian estontecon.

Utiligante sciojn pri socia statistiko, tiuj studentoj projektis detalan demandilon, interparolis kun tiuj knaboj kaj analizis la diversajn donitaĵojn kolektitajn. Finfine ili venis al konkludo, nome, inter la enketitaj knaboj 90% estonte eble havos travivaĵon esti korektitaj en punlaborejo.

De post tio pasis 25 jaroj. La profesoro donis ankaŭ al aliaj diplomiĝontoj novan taskon. Li lasis ilin ekzameni la prognozon antaŭ 25 jaroj, ĉu ĝi estas fidinda? Sekve tiuj ekzamenantoj plu envenis la kvartalaĉon. La antaŭaj knaboj nun jam fariĝis plenkreskuloj. Iuj ankoraŭ loĝis tie, pluraj transloĝiĝis alikvartalen kaj eĉ kelkaj el ili forpasis.. Sed post multaj klopodoj oni diversmaniere havigis al si kontakton kun 180 el la originaj 200 knaboj kaj konstatis, ke inter alie nur kvar personoj iam estis enprizonigitaj.



Kial la knaboj, kiuj longe loĝis tie kie ofte okazis teruraj krimoj, tamen akiris tiel bonajn notojn pri sia kreskado? Tio kompreneble embarasis kaj surprizis la esplorantojn. Poste ili estis informitaj, ke iu instruistino tiutempe instruis tiujn knabojn...

> "Mi ne scias, kion mi faris por la knaboj. Mi nur tre amis tiujn knabojn..."

Pere de la plua enketado, oni komencis scii, ke 75% de la knaboj ĉiuj estis edukitaj de unu virino. La esplorantoj serĉis la virinon kaj trovis ŝin en "hejmo de emeritaj instruistoj".

Do, kiel la virino alportis al la knaboj bonajn influojn? Kial la knaboj ĝis nun ankoraŭ memoras tiun ĉi virinon, post kiam tiom da jaroj jam pasis? La esplorantoj volis scii respondojn pri tiuj demandoj.

"Mi ne scias, kion mi faris por la knaboj." mallaŭte diris la honesta virino, "mi vere povas respondi nenion al vi". Sed kiam ŝi rememoris la scenojn antaŭ multaj jaroj, dum kiuj ŝi estis kune kun la knaboj, oni vidis, ke ŝi tuj montras sian kontentan rideton, murmurante al si: "Mi nur tre amis tiujn knabojn..."

# Nutri la malsatantojn...

Jaques TUINDER, NL

En mia loĝloko la Konsilantaro de Eklezioj organizas ciklon pri la 'la kristana taskaro pri mizerikordo'. La 25-an de februaro cento da homoj alfluis por mediti pri la temo ' nutri la malsatantojn' . Ni kolektiĝis en tiel nomata 'nutraĵobanko', tute nova fenomeno en Nederlando, unu el la ekonomie plej fortaj landoj en la mondo. Ĝi estas loko, kie ekstreme malriĉaj homoj ĉiusemajne povas senpage ricevi la plej necesajn vivrimedojn. Kaj la nombro de tiuj, kiuj bezonas la helpon de tiuj bankoj, ade kreskas. Ho, en la samaj tagoj ni legas en ĵurnalo, ke estro de granda entrepreno ĉijare ricevas financan rekompencon de ne malpli ol 14.000.000 eŭroj... Kaj por armeo kaj armiloj neniam mankas mono! Certe, ni vivas en mondo de grandegaj kontrastoj.

En pitoreska kapelo, pretigita kiel simpla sed varma manĝosalono, la ĉeestintoj komune partoprenis modestan supomanĝon kun pano, dum kiu ili povis aŭdi pensigajn tekstojn kaj laŭtemajn kantojn. *"Kiu kiel gasto ĝuas la fruktojn de la tero, scias, ke ĉiun pecon da pano ni povas dividi kun alia"*. Jen la kerno de la Evangelio!

Dum ni sidis kune, fama artisto el nia urbo pentris novan artaĵon, sur kiu li vidigis 'adaman' viron kaj 'evan' inon, feliĉe kaj senzorge vivantajn en paradizo, kiu plenas de pano, vino kaj ĉiaj al ni imageblaj kaj nutraj vivrimedoj.

En la kadro de la cikla temo oni montris al publiko kelke da tre belaj, al meditado invitantaj, t.n. 'malsato-pentraĵoj' el diversaj landoj kaj periodoj. En la serio la pentraĵo 'Vivanta Justeco' estas tute speciala, ĉar la kreaĵoj, kiuj estiĝis dum la pasintaj jaroj, trovas sian originon ĝuste en ĝi. Ĝi estas malsato-pentraĵo el la malfrua Mezepoko kaj devenas el Svislando. Oni nomas ĝin ankaŭ 'la malsato-pentraĵo' de Frato Klaŭs, ĉar ĝi devenas el la tradicio kiu naskiĝis ĉirkaŭ la sankta Nikolao de Fluho.

Sur la pentraĵo en rondaj medalionoj vidiĝas bildigitaj okazintaĵoj el la Nova Testamento: la vizito de la anĝelo al Maria, la naskiĝo de Jesuo, Lia reveno fine de la tempoj, Lia malliberigo, Lia krucumado kaj eŭkaristiaj prezentaĵoj. Sube oni trovas la simbolojn de la 'verkoj de kompatemo', kiujn mi prefere nomas: taskoj aŭ invitoj: viziti la malsanulojn, subtegmentigi la fremdulojn, manĝigi la malsatantojn kaj trinkigi la soifantojn, liberigi la prizonulojn, vesti la nudulojn kaj enterigi la mortintojn. La simboloj de la kvar evangeliistoj arte plenigas la angulojn.

Maldekstre kaj dekstre oni trovas kvar ilustrajn aktualigojn, kiuj rilatas pacon kaj justecon. Meze staras Kristo-Reĝo. Kiel Filo de Dio li plej profunde ĉeestas en la historio de la mondo kaj de la homaro. Ĉi tiu malsato-pentraĵo invitas al meditado pri la rilato inter justeco kaj kompatemo, inter nia fido kaj la faroj de la fido.

Resume, iniciato imitinda en aliaj lokoj!

# La vortoj de Jesuo Kristo sur la kruco

## Parto dua – la tri lastaj deklaroj

pastoro Bayo AFOLARANMI



### Kvina Deklaro

*"Jesuo, sciante, ke ĉio jam finiĝis, por ke plenumiĝu la Skribo, diris: Mi soifas"* (Joh 19:28).

Ordinare, kiam oni piediras, kuras aŭ laboras dum longa tempo, oni devas travivi soifon. Restante sur la kruco pli ol ses horojn, Jesuo Kristo jam perdis multe da ŝvito kaj sango, tial Li soifis. La laciĝo kiun Li travivis, la aflikto kiun Li sentis, la varmo de la tago, kaj la perdo de sango, estis la naturaj kaŭzoj de ĉi tiu soifo. Li ja soifis. Soifo estas unu el la plej ĉagrenaj cirkonstancoj dum la krucumado. Li ekkriis ke Li soifas. Tamen, ĉi tiu krio estis por plenumi la profetaĵon en Psalmo 69:21, "*Kaj ili donis al mi por manĝo galon, kaj en mia soifo ili trinkigis al mi vinagron."*

Estas evidente ke Li ne plendis pri la maljusteco kiun ili faris al Li batante Lin, kronante Lin per dorna krono, kaj eĉ alnajlante Lin sur la krucon. Ĉi tiu esprimo de soifo, kvankam reala por Li, ne estis plendo. Sed, Jesuo Kristo soifis je la glorado de Dio, kaj la efektivigo de la laboro de nia savo. Li montris Sian respekton al la Skribo farante ĉi tiun deklaron por ke ĉio antaŭdirita pri Li je la Skribo havu sian tutan plenumon en Li.

Estas fascine ke Li kiu antaŭe deklaris, *"Ĉiu, kiu trinkas el ĉi tiu akvo, denove soifos; sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo"* (Joh 4:13-14), soifis sur la roma kruco (vidu ankaŭ: Joh 6:35; 7:38). Tamen, Li soifis fizike sur la kruco por ke iu ajn kiu kredas je Li ne soifu spirite kaj eterne.

Unu grava apliko de ĉi tiu deklaro estas ke iu kiu ne volas soifi spirite kaj eterne devas kredi je Jesuo Kristo. Ĉu vi jam kredas je Li? Ĉu la riveroj de vivanta akvo fluas el vi?

### Sesa Deklaro

*"Kiam do Jesuo ricevis la vinagron, Li diris: Estas finite"* (Joh 19:30).

La sinsekvo de la kvina deklaro elprenis ĉi tiun sesan deklaron. Post kiam li ricevis la vinagron kiun oni donis al Li post kiam Li kriis ke Li

soifas, Li faris ĉi tiun deklaron: *"Estas finite."*

Iu klerulo pri la Sankta Biblio indikis kelkajn aplikojn de ĉi tiu deklaro.

- Unue, la malico kaj la malamikeco de Liaj persekutantoj jam finiĝis. Dio permesis ke ili faru ĉion kion ili volis fari.
- Due, la konsilo kaj ordono de Lia Patro pri Liaj suferoj nun estis plenumitaj. Li sciis ke estis la volo de Dio por Li travivi ĉi tiun aflikton sur la kruco. Li jam antaŭe diris en Johano 4:34, *"Mia nutraĵo estas plenumi la volon de Tiu, Kiu min sendis, kaj fini Lian laboron."* (Vidu ankaŭ Joh 5:36; 6:33, 38; 17:4) Nun Li jam finis la laboron.
- Trie ĉiuj simboloj kaj profetaĵoj de la Malnova Testamento, pri la nasko, vivo, kaj suferoj de la Mesio, estis efektivigitaj kaj respondıtaj.
- Kvare, la ceremonia leĝo estas aboliciita. La esenco nun venas, kaj ĉiuj ombroj estas forigitaj. Paŭlo klarigis ĝin pli bone en Efesanoj 2:14-16, "*Ĉar nia paco estas li, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la intermuron de disigo, en sia karno neniiginte la malamon, la leĝon de ordonoj en dekretoj; por krei en si el la du unu novan homon, tiel farante pacon; kaj por kunakordigi ambaŭ en unu korpo al Dio per la kruco, mortiginte per tio la malamon."*
- Kvine, peko estas finita. Ĉi tio plenumis la profetaĵon en Daniel 9:24, *"Sepdek jarsepoj estas destinitaj por via popolo kaj por via sankta urbo, por ke kovriĝu la kulpo, sigeliĝu la pekoj, kaj pardoniĝu la malbonagoj, por ke venu justeco eterna, sigeliĝu la vizio kaj profetaĵo, kaj sanktoleiĝu Plejsanktulo."*
- Kaj sese, Liaj suferoj nun estis finitaj, kaj tiuj de Lia animo kaj tiuj de Lia korpo. La ŝtormo finiĝas, la malbonaĵo estas for; ĉiuj Liaj doloroj estas je la fino, kaj Li estas ironta al Paradizo, komenconte la ĝojon starigitan antaŭ Li.

La sesa apliko estas kuraĝiga precipe por tiuj kiuj suferas por Kristo, kaj kun Kristo, ke momente ili ankaŭ diros, *"Estas finite."* Estas tiele ĉar, *"...nia malpeza kaj momenta sufero elfaras por ni, pli kaj pli ekster mezuro, eternan pezon da gloro"* (2 Kor 4:17). Tial, ne gravas la situacio kiun vi trapasas, vi ankaŭ baldaŭ deklaros, "Estas finite!"

## Sepa Deklaro

*"Kaj kriinte per laŭta voĉo, Jesuo diris: Patro, en Viajn manojn mi transdonas mian spiriton; kaj tion dirinte, li ellasis for la spiriton"* (Luk 23:46).

Ĉi tiu lasta deklaro de Jesuo Kristo sur la kruco estas simila deklaro al tiu de David en Psalmo 31:5, tial plenumante alian parton de la Skriboj. Lia morto estis konscia kaj propravola. Li forsendis Sian spiriton al la Patro. Neniu prenis ĝin el Li. Li demetis ĝin laŭcele sur la kruco. Li jam frue diris ĉi tion en Johano 10:17-18, "*Pro tio la*

*Patro min amas, ke mi demetas mian vivon, por ke mi ĝin reprenu. Neniu ĝin forprenas de mi, sed mi ĝin demetas memvole. Mi havas la rajton ĝin demeti, kaj mi havas la rajton ĝin repreni. Ĉi tiun ordonon mi ricevis de mia Patro."* Li demetis Sian spiriton en la manojn de la Patro atendante la tagon de releviĝo. Ĝi estas kiel rezervo de mono en banko atendante la tagon kiam oni uzos ĝin. Ĉi tiu deklaro estas pruvo de la nematerieco de la animo, kaj ĝia aparta ekzisto dum la korpo estas mortinta.

Estas multaj aplikoj de ĉi tiu lasta deklaro sur la kruco. Unue, Jesuo Kristo mortis kun la Skribo en Sia buŝo. Ankaŭ ni devus lerni kiel uzi la vortojn de Dio je nia ĉiutagaj agoj. Due, demetinte Sian vivon por ni, Li jam efektivigis la laboron de nia savo. Trie, Jesuo Kristo propravole donis Sian vivon al Dio pro ni, ankaŭ ni *"devus demeti nian vivon pro la fratoj"* (1 Joh 3:16). Kvare, ni devus montri ke ni estas libere pretaj morti, ke ni firme kredas je alia vivo post ĉi tiu, kaj havas deziron al ĝi, dirante, *"Patro, en Viajn manojn mi transdonas mian spiriton."*

# Pri la apokrifaj libroj

Komento de Tom NEIL

Tiuj libroj ne havas lokon en la liturgio de mia eklezio, kiu estas Skota Baptista. Mi memoras ke mia patro kiu estis laika predikanto, posedis libreton de la Apokrifo, sed ĝi neniam estas parto de nia Biblio. Ne posedante ekzempleron, mi ne vidis similan dum jaroj. Mi certe neniam legis iujn sed memoras nur la nomon Esdras kaj neniujn aliajn. Por intereso, mi faris demandojn al aliaj. Unu el la diakonoj en mia preĝejo diris ke li sciis pri ili sed vere ne legis. Hodiaŭ en Biblia studgrupo kiun mi gvidas, mi diris, "Se mi mencias la vorton Apokrifo, kio estas la signifo al vi?", unu/du aŭdis sed havis necertan scion, aliaj hezitis sed nebule memoris. Alia diris "Ĉu estas monumento en Egiptio aŭ Grekio?" Alia diris, "Ĉu estas "Revelation"?, kiu estas la angla nomo de Apokalipso. Vere, mi opinias ke al tre malmultaj la vorto estas familiara.



Mi parolis al mia pastora amiko pri la Apokrifo. Li diris ke li bone konas la librojn, sed ne predikas el ili. Kelfoje li eble citas versiklon aŭ parolas pri iu temo en ĝi. Li opinias ke li rajtas tion fari kun mencio pri la fonto, same kvazaŭ li citos de Aŭgusteno aŭ verkoj de hodiaŭaj teologoj.

# Pri la tragedioj en la rusaj ortodoksiaj preĝejoj



Libere tradukita de Larisa Kuzmenko, el la artikolo de la loka gazeto "Tagiljskij raboĉij"

La unua tragedio okazis la unuan de decembro pasintjare en la Tvera regiono de Ruslando. En la vilaĝo Prjamuhino dum incendio pereis la pravoslava pastro Andreo kun sia edzino kaj siaj tri infanoj. Oni diras, ke la domo de la pastro estis bruligita de iuj fiuloj kontraŭ kiuj la pastro predikis, ĉar ili drinkis kaj batis siajn edzinojn kaj infanojn.

Ĉi-jare antaŭ la tago de Kristnasko (la 6-an de januaro) estis mortigita Oleg Stupiĉkin la estro de la templo je la nomo de Petro kaj Paŭlo en la Alapajevska distrikto de Sverdlovskaja regiono. El la templo estis ŝtelitaj 21 ikonoj inter kiuj estas la ikono de la 18-a jarcento, la Tihvina kaj Smolenskaja ikonoj de Dipatrino, la ikono de Nikolao la Miraklisto kaj aliaj. La edzino de la pastro telefonis al la milicejo tuj post la malfeliĉo kaj baldaŭ estis arestitaj du 32-jaraj loĝantoj de la urbo Alapajevsk. Okazis, ke ili jam pli frue ankaŭ estis arestitaj kaj eĉ juĝitaj. La milicanoj elprenis de ili la ŝtelitajn ikonojn kaj trovis en la apuda tombejo aliajn ikonojn.

Oni eksciis, ke vespere la krimuloj venis en la templon kaj volis paroli kun la pastro. Li konsentis kaj diris al sia edzino, ke li revenos post unu horo. Kiam li ne venis la edzino iris en la templon kaj ekvidis, ke tie estis tre kaosa fumo. Poste ŝi rakontis: "La templo estis malfermita. Mi eniris ĝin kaj tie estis tre malbona fumo, mi vokis mian edzon, sed li ne respondis. Mia koro sentis, ke io okazis kaj mi telefonis la milicejon."

La milicanoj trovis, ke la krimuloj uzis metalan tubon por bati la kapon de la pastro kaj li mortis pro tio. Por kaŝi sian krimon la krimuloj bruligis la pastron kaj la benkojn en la templo, tamen incendio ne okazis, ĉar la templo estas konstruita el ŝtono.

La templo estis detruita dum la revolucio kaj nun ĝi estas restaŭrata laŭ la malnovaj desegnaĵoj. Do, la profesio de pastroj, servantoj en temploj kaj preĝejoj fariĝas danĝera en Rusio ĉar la morala stato en la rusa socio estas ege malbona. Pri tio parolas jam multaj homoj. La mortigo de la pastro antaŭ la festo estas vera ŝoko por la lando. La arĥiepiskopo de nia regiono Vikentio diris, ke tio estas indigniga kaj netolerebla krimo. Necesas batali por la morala socio.

La edzino de la pastro kaj kvar infanoj decidis loĝi en la monaĥejo de la urbo Sredneuralsk.

# Dietrich Bonhoeffer – martiro de la 20-a jarcento

Kompilis Siegfried KRÜGER, DE

*"Oni devas obei Dion prefere ol homojn"* (Ago 5:29)




En Breslaŭ (nuna Wrocław), la naskiĝurbo de Dietrich Bonhoeffer, memorigas lin per impona monumento.

Martiroj sekvas ĉi tiun vorton. La unua martiro de la kristanismo estis Stefano (Ago 7: 54-60). Kriterioj por martiroj estas:

- Ili vivas kaj mortas sekvante Jesuon,
- Ilia morto - alimaniere ol ĉe Jesuo Kristo - ne havas gracan karakteron,
- Martiroj ne nur konfesas la kristanan kredon, ili ankaŭ estas ag-atestantoj de la Dia justeco. Tio signifas, ke ili estas aktivaj en la rezistado.
- Martiroj estas speciale honorigitaj en la eklezio, sed ne kiel Jesuo Kristo. Ilia sorto restas en la memoro de la eklezio kiel atesto pri la Dia graco, kiel modelo de la kredo kaj kiel memoro al devoligo de ĉiuj kristanoj.

Por la protestantoj martiroj ne estas sanktuloj katolika sence. Sankta neniu estas pro pia konduto kaj pro morala kvalito. Sole Dio estas tiu, kiu homon sanktigas. Tial la sankteco neniam estas nia propra, sed sole la sankteco de Kristo. Tiaj sanktuloj, al kiuj apartenas ĉiuj kredantoj, ne estas senpekaj, ili estas neperfektaj, sed ili fidas je Kristo.



Super la ĉefportalo de la Westminster-abatejo en Londono (bildo apude) staras ŝtonfiguro de Dietrich Bonhoeffer ekde 1998 apud naŭ aliaj martiroj de la 20-a jarcento, inter ili Maximilian Kolbe kaj O. A. Romero. Bonhoeffer estas tie la ununura germano.

## Dies irae

Dies irae, dies illa
solvet saeclum in favilla,
teste David cum Sybilla.

Quantus tremor est futurus
quando judex est venturus,
cuncta stricte discussurus!

Tuba mirum spargens sonum
per sepulchra regionum
coget omnes ante thronum.

Liber scriptus proferetur
in quo totum continetur
unde mundus judicetur.

Judex ergo cum sedebit,
quidquid latet, apparebit,
nil inultum remanebit.

-- Recordare, Jesu pie,
quod sum causa tuae viae,
ne me perdas illa die.

Confutatis maledictis
flammis acribus addictis,
voca me cum benedictis!

**Thomae a Celano**

## Tago de kolero

Tago de dia kolero
kiam cindriĝos la Tero,
pruvitas ties alveno.

La vivantoj tremegontas,
la Juĝisto alvenontas,
tutan mondon prijuĝontas.

Mire sonas la fanfaroj,
mortintoj el ĉiuj jaroj
iras al la trono – aroj.

Malfermiĝas Libro sankta,
ĉiun pekon enhavanta,
kio estas prijuĝenda.

Kiam falos la Verdikto,
nenio restos sekreto –
granda krimo aŭ peketo.

-- Jesuo, vi ne forgesis,
ankaŭ por mi vi suferis,
pekulon vi ne forĵetis.

La krimulojn vi malbenas,
en inferon ilin ĵetas,
sed min damni ne konsentas.

**Tomaso de Celano**
*(Trad. Endre Dudich*)

**Tomas av Celano** naskiĝis en Celano, Italio. Li mortis ĉirkaŭ 1250. Li estis itala lirikisto kaj historiverkisto kaj konata pro sia verko pri Francisko de Asizo.